



La tupia lingvo

Fabricio POSSEBÓN

Enkonduko

Kiam la portugaloj atingis unue Brazilon en la 22-a de aprilo de 1500, post kvardekkvar-taga transoceana vojaĝo, ili trovis ĉe la marbordo, en la nuna ŝtato *Bahia*, diversajn indianojn. Kiel atendite, en la karaveloj estis interpretistoj, kiuj parolis kelkajn lingvojn, nome, la latinan (pro ĝia kultura valoro), la araban (pro komerca graveco), la hebrean (eble se ekzistus iu homa grupo "perdita" tra la mondo, tiu scipovus ankoraŭ la paradizan lingvon, laŭ la tiama religia kompreno), kaj siajn gepatrajn lingvojn (la portugalan, la hispanan, la italan k.t.p.).

Kiel rakontas la unua dokumento de Brazilo, tio estas, la letero, kiun skribis *Pero Vaz de Caminha* al la portugala reĝo, nenia interkompreno stariĝis inter la blankuloj kaj la indianoj. Laŭ la sama dokumento, ni scias, ke la indiĝenoj akceptis la vojaĝantojn pace kaj amike, kaj jam miregis pro la nova teĥnologio ĵus alveninta, ĉar ili tute ne konis la ŝtalan hakilon (oportunan anstataŭiganton de la ŝtona hakilo), la martelon, la najlojn, la metalajn segilojn, la tondilon k.t.p. En tiu momento iamaniere la indianoj sklaviĝis pro la subita senprokrasta neceso de tiaj laboriloj.

Post kelkaj tagoj, la karaveloj foriris, en la 2-a de majo: unu revenis Portugalon, la aliaj celis Hindion, en Azio. Du degreditoj estis forlasitaj en la ĵus eltrovinta lando, kaj du maristoj, sen oficialaj permesoj, ankaŭ restis kun la indianoj.

Du jarojn poste, alia ekspedicio retrovis la degreditojn kaj ilin akceptis. Ilia scio pri la lingvo kaj indianaj moroj estos tre utilaj en la sekva konkerado de la tuta lando. Pri la maristoj oni scias nenion.

Lingvistika situacio

Laŭ la kalkuloj de profesoro *Aryon Dall' Igna Rodrigues* (*Queixalós & Renault-Lescure*, p. 15-28), en la tempo de la koloniigado, estis en Brazilo ĉirkaŭ 1.200 lingvoj, parolataj de 5 milionoj da indianoj. Nuntempe ankoraŭ restas 180 lingvoj kaj 300-350 mil indianoj. Do, ĉiu jarcento mortigis proksimume 200 lingvojn kaj tiu tendenco ankoraŭ daŭras, malgraŭ la laboroj de la lingvistoj.

Oni scias malmulte pri tiuj lingvoj forpasintaj, ĉar la plej granda kvanto simple malaperis kune kun siaj parolantoj mem, kelkfoje oni konservis nur la nomon, aliffoje etan liston da vortoj. Se ni observas la nunan mapon de la indianaj lingvoj, ni trovas terurajn nombrojn, ekzemple: la lingvo *apiaka* havas 2 parolantojn, *ava canoeiro* nur 4, *baré* nur 1, *korama* 5, kaj tiuj informoj estas el la jaro 2000, eble nun ili ne plu ekzistas!

El la kolonia periodo, oni konservis detalajn informojn nur pri du lingvoj: *kariri*, parolata en la nord-orienta parto de la lando, kaj *tupia*, vaste uzata laŭlonge de la marbordo, de nordo al sudo (*Rodrigues*, 1994).

Kiel bone konate, la komercaj entreprenoj de koloniigado postulis moralan pravigon, do la esploristoj ne celis "profitojn" sed disvastigi kristanisman tra la tuta mondo, aŭ, kiel diris *Camões* (1572) verse:

Pri reĝoj postlasintaj nomojn glorajn
en la memor', ĉar ili prosperigis
la fidon, l' imperion, kaj senmorajn
afrikajn kaj aziajn landojn ligis.

La Luzidoj, 2, v.1-4 (Traduko de Leopoldo H. Knoedt)

La papo kaj la reĝoj do interkonsentis pri la religia misio, kaj ene de la karaveloj foriris ankaŭ la jezuitoj por kristanigi la indiĝenojn ĉie. En Brazilo elstaris *Jozefo de Anchieta* (legu *anĝieta*), alveninta en 1553. Kiel klera humanisto li bonege scipovis la latinan lingvon, krom la hispanan, sian patrinan lingvon, kaj la portugalan. Tute certe li studis la malnovgrekan kaj pro familia deveno li eble scipovis ion el la baska kaj la hebrea.

Post malmulte da tempo ĉe la indianoj en Brazilo, li jam scipovis perfekte la tupian lingvon kaj verkis la unuan gramatikon pri tiu lingvo: "Gramatika arto de la lingvo plej uzata ĉe la brazila marbordo" (publikigita en Portugalio, en 1595). La indiana lingvo ne havis propran nomon kaj la indianoj mem diradis pri ĝi *abá-nhe'enga*,

tio estas, "homa lingvo". En tiu tempo, oni ankaŭ diradis "landan lingvon" aŭ "maran lingvon", poste "brazilan lingvon", kaj nuntempe plej ofte "tupian lingvon". Tiu lingvo ankoraŭ estas parolata en Brazilo, sed ne plu ĉe la marbordo, ĉar preskaŭ ne plu ekzistas indianoj tie. Nun ĝi estas parolata kiel gepatra lingvo (kaj dua lingvo de kelkaj indianoj de aliaj homgrupoj) de ĉirkaŭ 50 mil loĝantoj ĉe la riverbordo de Amazono, norda parto de Brazilo. Ĝia nuna nomo estas *nheengatú*, tio estas "bona lingvo".

Indiana Kateĥizado

Estis tuja eltrovo de la jezuitoj la fakto, ke ili mem devis lerni la lokajn lingvojn por kateĥizado, ĉar malfacile la indianoj scipovus la latinan lingvon por ricevi la spiritajn instruojn. *Jozefo de Anchieta* mem verkis la kateĥismajn librojn, kelkajn teatraĵojn kaj poemojn en la tupia, krom la jam cititan gramatikon.

Bedaŭrinde el tiu vasta produktaĵo nenio priskribas la indianojn laŭ ilia vidpunkto, ĉar ĉio estas kribrita per la kristanaj okuloj. Do oni ne trovas la indianajn legendojn, escepte de kelkaj referencoj, sed tiukaze la celo estas ilin kritiki kiel abomenajn. Ni donas nun kelkajn fragmentojn (*Navarro*, p. 140) por ke la leganto povu apreci la tupian poezion, originale verkitan, laŭ la tiamaj eŭropaj modeloj rilate al la temoj kaj metriko.

Pri Maria, patrino de Jesuo:

<i>N'i tyb-i t-uguy</i>	Ne estis sango
<i>Nde membyr-a'-sa'-pe.</i>	ĉe via akuŝo.
<i>Endé, nde iybá-pe</i>	Vi, en viaj brakoj,
<i>Iesu ere-s-upi.</i>	Jesuo levis.
<i>I membyra o-'ar umã</i>	Via filo naskiĝis jam,
<i>amõ putuna r-esé</i>	en certa nokto,
<i>pitang-î-porang-eté.</i>	belega infaneto.
<i>I xy na s-uguy-i tiruã</i>	Lia patrino eĉ ne sangis,
<i>i-aku'í, n'i kuar-i nhê.</i>	ŝi estis seka, ne borita, ja.

Miaj tradukoj celis nur rekrei la originalan signifon, do ne estas poezie valoraj. Oni priatentu la lastan verson, ĉar *Anchieta* ne trovis vorton por virgineco en la tupia lingvo, li do uzis tiun pezan esprimon "ne borita". Li genie devis eltrovi multajn diraĵojn por la novaj konceptoj kaj la indianoj mem multfoje solvis la problemojn. Mi donas ekzemplon. La indianoj ne konadis la "hundon" kaj kiam ili ĝin

vidis, ili ĝin nomis "jaguaron". Evidente la jaguaro multe diferencas de la hundo, do ili ekuzis *iaguar-eté*, tio estas, "jaguaro vera", por la jaguaro mem kaj la hundo restis nur jaguaro. Fine, mi prezentos specimenon (*Navarro*, p. 504) ankaŭ el *Anchieta*, kiu iel montras ion, kvankam deformitan, el la originalaj indianaj moroj.

La diablo Gŭajŝarao bedaŭras la novan epokon:

<i>Moraseia é i katu,</i>	Dancado estas ja bona,
<i>ie-guaka, ie-mopyranga,</i>	ornamiĝi, ruĝe farbiĝi,
<i>s-á'-mongy, ie-tymã-guanga,</i>	plume ŝmiriĝi, herbe kolorigi la krurojn,
<i>ie-moúna, petymbu,</i>	nigre koloriĝi, fumadi,
<i>karai'-monhã-monhanga,</i>	fariĝi plurfoje profeto,
<i>ie-moyrõ, mor-apiti,</i>	enuiĝi, mortigi homojn,
<i>io-'u, tapuia r-ara,</i>	vori unu l' alian, kapti malamikojn,
<i>aguasá, moro-potara,</i>	adultadon, voluptemon,
<i>manhana, syguaraiy:</i>	kalumnion, prostituadon,
<i>n'a-i-potar-i abá s-eiara.</i>	mi ne volas, ke la indianoj ilin forlasu.

Tiu ruza jezuita teksto intermiksas antikvajn indianajn morojn kun moralaj kristanaj valoroj, kaj ĝi estas speciale grava ekzemplo por montri la egajn miskomprenojn de la unuaj koloniaj tempoj.

Resume, el tiuj jarcentoj de kunvivado, intermiksiĝis la popoloj, jen indiĝenaj jen afrikaj aŭ eŭropaj, kaj la portugala lingvo, en la brazila dialekto, konservas nun 10.000 vortojn indian-devenajn, precipe el la tupia. Tiu vortprovizo estas toponimoj (nomoj de riveroj, montoj, montaroj, plaĝoj, urboj, ŝtatoj – pli aŭ malpli duono el la ŝtataj brazilaj nomoj), nomoj de manĝaĵoj, plantoj, animaloj, fiŝoj, insektoj, dancoj, festoj, tradicioj, personoj kaj popularaj esprimoj, kiel *nhem nhem*, esperantligve "ta ta ta" (*nhe'eng* en la tupia estas la verbo "paroli", *nhe'eng* *nhe'eng* estas "parolegi, babilo"). Alia kurioza ekzemplo. La personoj el la malaltaj tavoloj de nia socio salutas unu la alian demandante: "ĉu vi venis?", kaj la respondo estas: "jes, mi venis". Tio ekzakte estas la tradukoj de la indianaj salutoj: "*ere-iur-y-ŝi*" kaj la respondo: "*pá, a-iur*".

Bibliografio kun komento

CAMÕES. *La Luzidoj*. El la portugala lingvo tradukis *Leopoldo H. Knoedt*. Enkonduko de la akademiano *Geraldo Mattos*. Serio "Oriente-Okcidento" n-ro 14. *Chapeçó* - Brazilo: Fonto, 1980. Majstroverko de la portu

gala lingvo. Granda eposo pri la navigadoj de la portugaloj, en la dek-sesa jarcento, cele al la riĉaĵoj de Hindio.

LORENZ Francisco Valdomiro. *La Brazilaj Aruakoj*. Serio "Brazilaj Kaje-roj" n-ro 3. *Brasília* – Brazilo: Laborgrupo "Antaŭen", 1983. Libreto pri etnografio de la brazilaj indianoj. La aŭtoro estis unu el la veteranoj de la E-movado kaj lia mirinda lingvoscio donas grandan aŭtoritaton al la verko.

NAVARRO Eduardo de Almeida. *Método Moderno de Tupi Antigo. A língua do Brasil dos primeiros séculos. São Paulo: Vozes, 1998*. Kompletaj kaj aktuala metodo de la tupia lingvo, en la portugala. La aŭtoro estas profesoro pri la tupia lingvo ĉe Universitato San-Paŭlo. La verko prezentas plurajn lecionojn, kun ekzercoj, vortaro kaj riĉa ekzemplaro. Mi persone multe ŝuldas al tiu metodo, kiun mi sekvis kiam mi estis universitatano. Evidente, ĉiuj eventualaj eraroj en mia artikolo estas sendube miaj.

QUEIXALÓS, F. & RENAULT-LESCURE O. *As línguas amazônicas hoje. Las lenguas amazónicas hoy. Les langues d'Amazonie aujourd'hui. The Amazonian languages today. São Paulo: Instituto Socioambiental, 2000*. Kolekto da aktualaj tekstoj, el la lingvoj de la librotitolo, pri diversaj temoj rilatantaj la sud-amerikan staton de la indianaj lingvoj. Valoraj mapoj akompanas la volumon.

RODRIGUES, Aryon Dall' Igna. *Línguas Brasileiras. Para o conhecimento das línguas indígenas. São Paulo: Loyola, 1994*. Portugallingva libro de universitata profesoro. Nia plej elstara aŭtoritato pri indianaj lingvoj. La verko prezentas ion pri la postrestintaj 180 brazilaj lingvoj, inkluzive iliaj familioj kaj la nuna stato de la studoj, kun riĉa bibliografio.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Fabricio POSSEBON
Av. Profa. Maria Sales, 500, apt. 32, Tambauí
58.039-130 João Pessoa, Paraíba
BRAZILIO
<possebon@usp.br>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas universitata profesoro pri klasikaj lingvoj (latina, greka kaj sanskrita) ĉe la Federacia Universitato de Paraíba. Li magistriĝis pri Klasikaj Studoj per la portugallingva tezo *Batrakomiomakhia* – "La batalo inter la musoj kaj la ranoj" de Homero: studo kaj traduko. Nuntempe li doktoriĝas pri Beletro. Lia tezo temas pri la unua literatura brazila verko: *De Gestis Mendi de Saa* (La sagao de *Mem de Sá*) de la jezuito José de Anchieta.

Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)
Hejmpaĝo: <http://www.eventoj.hu/isae/>

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.

Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj

Laserkopiita: Februaro 2007

ĉe Copy & Co, Marktplatz 30, DE - 37269 Eschwege/Germanio

Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare

pagebla pere de via

a) landa peranto (resp. landa delegito)

aŭ rekte al

b) ISAE-konto ĉe UEA/Rotterdam (NL): isae-z *) vd. sube

t. e. vi pagu (anstataŭ al ISAE/Sachs) al la germana poŝtĉeka konto

de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en Köln, Germanio, kun

indiko "ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z"

IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF

Landaj Perantoj de ISAE

Aŭstralio	Libroservo AEA 143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.	<libroservo@esperanto.org.au>
Brazilo	Brazila Esperanto-Ligo (BEL) C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília	<bel@esperanto.org.br>
Britio	S-ro David Kelso 5, Craighill Rd., Kilncadzow GB – Carlisle, ML8 4QT	<davidekelso@yahoo.co.uk>
Finnlando	S-ino Päivi Saarinen Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo	<paivi.saarinen@iki.fi>
Francio	S-ro Charles Trébouet Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil	<trebouet.bohere@compagnet.fr>
Irlando	S-ino Joy Davies 9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W	<noviresp@eircom.net>
Korea Resp.	S-ro Cho Sung Ho Biol. Fak. Inha Univ., KR Incheon 402-751	<shcho@inha.ac.kr>
Norvegio	Eldonejo Esperanto Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo	<hara-ryg@online.no>
Pollando	S-ino Maria Majerczak ul. Armii Krajowej 7 m 122, PL - 30 150 Kraków	<mamajer@interia.pl>
Svedio	S-ino Lisbeth Andréasson Södra Rörum pl. 455, SE 24294 Hörby	<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>
Usono	Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA) P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA	<elna@esperanto-us.org>

*) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b)

(kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu

sendata Scienca Revuo) la eldonanton:

Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio
Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>